

Bengt-Arne Wickström
Andrássy-Universität, Budapest

Planlingvoj kaj piĝinaj/kreolaj lingvoj: Komunikiloj el la skribotablo aŭ pro bezono. Komparo de kelkaj aspektoj de esperanto kaj tokpisino

Resumo: Piĝinaj/kreolaj lingvoj estiĝas pro la neceso komuniki en sociaj situacioj sen komuna lingvo. Almenaŭ kelkaj planlingvoj estas kreitaj de siaj aŭtoroj por faciligi komunikadon inter homoj de malsimilaj denaskaj lingvoj. En la unua kazo do spontanee ekkreiĝas la lingvaj rimedoj kaj en la dua ilin konscie kreas la aŭtoro de la lingvo. Nia hipotezo estas, ke en ambaŭ situacioj similaj strukturoj rezultas. Por testi tiun hipotezon ni komparas la strukturon de tokpisino kun tiu de esperanto laŭ kelkaj principe ekonomikaj kriterioj por optimuma strukturo de la lingva sistemo: klareco kaj koncizeco, precizeco kaj flekseco kaj ankaŭ reguleco kaj oportuneco. Post klariga diskuto de la kriterioj kelkaj aspektoj de la leksiko, morfologio kaj sintakso de la du lingvoj estas komparataj. Ni povas konkludi, ke ili havas multe da similaĵoj, sed ankaŭ kelkajn diferencojn. Tamen, ne eblas forĵeti la hipotezon, ke la spontanee evoluinta tokpisino kaj la konscie planita esperanto trovis similajn solvojn al la problemoj ebligi efikan komunikadon.

Ŝlosilvortoj: Planlingvoj; Piĝinaj/kreolaj lingvoj; Esperanto, Tokpisino; Optimuma strukturo de lingvaj sistemoj.

Planned languages and pidgin/creole languages: Means of communication from the writing desk or from necessity. A comparison of some aspects of Esperanto and Tok Pisin.

Abstract: Pidgin/creole languages are born out of the need to communicate in social situations without a common language. At least some planned languages are created by their initiators to facilitate communication between people of different native languages. In the first case, therefore, linguistic resources are spontaneously created; in the second one, the author of the language consciously creates them. Our hypothesis is that both situations lead to similar structures. In order to test this hypothesis, we compare the structure of Tok Pisin with that of Esperanto according to some basically economic criteria for an optimal structure of

the language system: clarity and conciseness, precision and flexibility, as well as regularity and convenience. After a clarifying discussion of the criteria, some aspects of the lexicon, morphology and syntax of the two languages are compared. We can conclude that they have many similarities, but also some differences. However, it is not possible to rule out the hypothesis that the spontaneously evolved Tok Pisin and the consciously planned Esperanto have found similar solutions to the problem of enabling efficient communication.

Keywords: Planned languages; Pidgin/creole languages; Esperanto; Tok Pisin; Optimal structure of language systems.

Plansprachen und Pidgin-/ Kreolsprachen: Kommunikationsmittel aus dem Schreibtisch oder wegen Bedarfs. Ein Vergleich einiger Aspekte des Esperanto und des Tok Pisin.

Zusammenfassung: Pidgin-/Kreolsprachen entstehen wegen des Bedarfs der Kommunikation in Begegnungen ohne eine gemeinsame Sprache. Zumindest einige Plansprachen sind von ihren Autoren erschaffen worden, um Kommunikation zwischen Menschen verschiedener Muttersprachen zu erleichtern. Im ersteren Falle entstehen also sprachliche Ressourcen spontan; im letzteren Falle schafft der Autor der Sprache sie bewusst. Unsere Hypothese ist, dass beide Fälle zu ähnlichen Strukturen führen. Um diese Hypothese zu untersuchen, vergleichen wir die Struktur des Tok Pisin mit der des Esperanto mit Referenz zu einigen einfachen ökonomisch inspirierten Kriterien für das Sprachsystem: Klarheit und Knappheit, Präzision und Flexibilität sowie Regelmäßigkeit und Bequemlichkeit. Nach einer klarstellenden Erörterung der Kriterien werden einige Aspekte des Lexikons, der Morphologie und der Syntax der beiden Sprachen verglichen. Wir können schlussfolgern, dass viele Ähnlichkeiten vorhanden sind, aber auch Unterschiede. Es ist allerdings nicht möglich, die Hypothese auszuschließen, dass das spontan entwickelte Tok Pisin und das bewusst geplante Esperanto ähnliche Lösungen zum Problem, effiziente Kommunikation zu ermöglichen, gefunden haben.

Schlüsselwörter: Plansprachen; Pidgin-/Kreolsprachen; Esperanto; Tok Pisin; Optimale Struktur des Sprachsystems.

1 Enkonduko

En tiu ĉi eseo ni rigardos lingvon el la komunika vidpunkto. Kompreneble lingvo havas multe da funkcioj, ne nur komunikajn. Eble la plej grava estas la identeca funkcio. Identeco kaj kulturo estas tre proksime ligitaj al lingvo. Tamen kelkaj lingvoj estiĝis pro la neceso de komunikado. Tiaj lingvoj estas la tiel nomataj piĝinaj lingvoj. Ili estiĝas en sociaj situacioj, kiam homoj kun malsamaj lingvaj repertuaroj kuniĝas kaj devas komuniki. La vortaron ofte oni transprenas de unu lingvo, tre ofte de lingvo kolonia aŭ altstatusa (supertavola aŭ superstrata), kaj ĝi adaptiĝas sub la influo de la denaskaj lingvoj de la parolantaro, precipe fonetike. La gramatika strukturo, tamen, ĝenerale estas derivita de la lingvoj de la parolantaro de la malaltstatusaj lingvoj, la subtavolaj aŭ substrataj lingvoj. Ebla hipotezo estas, ke en tia situacio analiza reguleco ludos gravan rolon por la gramatikaj reguloj.

Aliflanke, ekzistas tiel nomataj planlingvoj, kiuj estiĝis ĉe la skribotablo de iniciatanto de la lingvo. Ties celo ofte estas krei “simplan” lingvon, kiu estas facile lernebla kaj per kiu eblas facile komuniki ĉe homoj de malsimilaj denaskaj lingvoj. La vortaro de la planlingvoj en multaj kazoj baziĝas sur komunaj vortaroj de la celataj lingvogrupoj. La vortprovizo povas esti draste reduktita al malmultaj vortradikoj, kiuj kombineblas por krei parton de la leksiko. Por eŭropano tio ĝenerale signifas uzi latin- kaj grekdevenajn vortojn por la baza vortaro. La gramatika strukturo povas esti draste reduktita al analiza reguleco.

Tiuj du ĝeneralaj priskriboj ŝajne taŭgas por priskribi la piĝinan/ kreolan lingvon tokpisino kaj la planlingvon esperanto. Oni povas diri, ke tokpisino estiĝis pere de spontanea malcentriginta procezo, kaj esperanto pere de planita centrigita procezo. Interesaj demandoj estas, ĉu la du procezoj estas optimumigitaj laŭ iu kriterio, kaj ĉu la du procezoj kondukis al simila rezulto. Ekonomikisto tentiĝus metafore kompari la du procezojn al bonfarta ekonomiko kaj la merkato. Centra rezulto de ekonomika teorio estas, ke bone funkcia merkato produktas socian ordon, kiu estas optima (laŭ la kriterio de Pareto), kaj ĉiu optimumigita socia situacio povas esti realigita pere de funkcia merkato.¹ Tiu ĉi studo do levas la hipotezon, ke la spontanea interago de individuoj en senpera kontakto kondukas al lingvosistemo, kiu similas al planita optimumigita sistemo elpensita de lingvo-kreanto serĉante optimuman komunikadon. Por testi la hipotezon ni uzos kiel ekzemplon tokpisinon kaj esperanton. Kompreneble unu ekzemplo ne sufiĉas por fari hipotezon kredinda aŭ pruvi ĝin falsa. Ni povas nur levi la demandon kaj klopodi montri la vojon al plia esploro.

1 Kelkaj pliaj supozoj koncerne la tipon de bonoj ankaŭ necesas.

2 Optimuma komunikado

Jam ekzistas vico da studoj pri optimumigo de komunikado. Pri la strukturo de piĝinaj kaj kreolaj lingvoj vidu ekzemple Ansaldo (2017), Gelderen (2004), Good (2012), Good (2015) aŭ Parkvall (2008). Nash (2014) donas komparon inter la strukturoj de aro da piĝinaj kaj kreolaj lingvoj. Optimumigon en planlingvoj analizas inter aliaj Chiari (2007), Gobbo (2017) kaj Lo Jacomo (1989). Heil (1999), Liu (2001a), Liu (2001b), Mühlhäusler (1992) kaj Philippe (1991) komparas la strukturon de piĝinaj aŭ kreolaj lingvoj kun tiu de planlingvoj. Ankaŭ la socilingvistikaj aspektoj estas diskutataj de kelkaj el ili.

Ni prezentos ĉi tie kelkajn ekonomike inspiritajn kriteriojn por optimumigo. Ekonomikisto scias, ke optimumo ĝenerale signifas kompromison inter multaj dezirindaĵoj, ofte karakterizeblaj kiel kostoj kaj utilo. Unuflanke oni volas ŝpari penon sed aliflanke senerare komuniki. Peno povas signifi streĉon en uzo. Oni do volas senstreĉe senerare komuniki. Kelkaj aspektoj de komunikado estas klareco, precizeco, reguleco, koncizeco, flekseco kaj oportuneco. Tiuj dezirindaĵoj tamen ofte kontraŭas unu la alian. Tiuj celkonfliktoj estas temo por tiu ĉi sekcio.

2.1 Klareco kontraŭ koncizeco

Klareco tipe esprimiĝas per redundo. Ju pli da redundo, des pli facile komprenebla estas eldiro. Tamen redundo signifas penon en la produkto de la esprimo, kaj ju pli da redundo des pli da peno por la parolanto. Optimumiganta parolanto do serĉas kvanton da redundo donante ekvilibron inter la du fortoj klareco kaj koncizeco. Rigardu la belajn heksametrajn liniojn de Goethe:²

2 Mi redonas ĝin en la originala ortografio de Goethe, ĉar tiu kun frakturaj litertipoj bone ilustras la argumentojn de tiu ĉi sekcio. Tiu litertipo ĝenerale estas pli bone adaptita al la germana fonetiko kaj kelkaspekte pli konciza ol la moderna “antikva” litertipo nun uzata kaj kelkaspekte pli klara ol ĝi. En la ekzemplo la koncizeco troviĝas en la grafemoj **đ** kaj **ff**, kiuj en antikva litertipo hodiaŭ fariĝas po du grafemoj (ch kaj ff). En la fraktura skribo troviĝas multaj tial unugrafemaj ligaturoj, kiuj senpere korespondas al germanaj fonemoj, ekzemple **đ**, **ŝ**, **ŝ**, el kiuj hodiaŭ ĝenerale nur “**ß**” estas uzata kiel unugrafema signobildo en la tipografio. La uzo de ligaturoj do signifas koncizeco. La uzo de la funkcie malsimilaj **f** kaj **ŝ**, ambaŭ ĝenerale skribataj kiel “s” en antikvaj litertipoj, tamen montras plian klarecon, ĉar oni povas tuj diri, ĉu estas fino de silabo aŭ ne. Kompreneble alilingvanoj ne necese trovas la frakturan skribon helpema dum la lernado de la germana, kaj verŝajne pro tio la naciista germana registaro la 3an de januaro 1941 forigis la frakturan litertipon de oficiala uzo, postulante nuran uzon de antikvaj litertipoj.

Sorgsam brachte die Mutter des klaren, herrlichen Weines,
 In geschliffener Flasche auf blankem, zinnernem Runde,
 Mit den grünlichen Römern, den echten Bechern des Rheinweins.³

Goethe (1814, p-oj 23–24)

En la unua linio estas markita la genitivo dufoje, en la dua linio la dativo trifoje kaj en la tria linio la dativo post la prepozicio *mit* kvarfoje kaj la genitivo dufoje. Sufiĉus por ĉiuj esprimendaj informoj unufoje markita genitivo en la unua linio, unufoje markita dativo en la dua linio kaj unufoje markita genitivo en la tria linio. La dativon post la prepozicio *mit* en la tria linio tute ne necesus esprimi. La germana estas relative riĉa en redundo, kaj tio malmulte kontribuas al klareco.


TABELO 2.1 La konjugacio de *paroli* en ses lingvoj

esperanto	tokpisino	franca	ĉina	hispana	germana
paroli	tok	parler	说	hablar	sprechen
mi parolas	mi tok	je parle	我说	hablo	<u>ich</u> spreche
vi parolas	yu tok	tu parle(s)	你说	hablas	<u>du</u> sprichst
li parolas	em i tok	il parle	他说	habla	<u>er</u> spricht
ni parolas	mipela tok	on parle	我们说	hablamos	wir sprechen
vi parolas	yumi/yupela tok	<u>vous</u> parlez	你们说	habláis	<u>ihr</u> sprecht
ili parolas	ol i tok	ils parle(nt)	他们说	hablan	sie sprechen

Tiun redundon en la germana ni ankaŭ trovas en la konjugacio. Komparu la konjugacion de la verbo *paroli* en ses lingvoj en tabelo 2.1. En tri lingvoj, esperanto, la ĉina kaj la hispana, tute mankas redundo. En esperanto la persono esprimiĝas per persona pronomo, en la ĉina per persona pronomo kaj markilo de pluralo kaj en la hispana per sufiksoj. En la (kolokva) franca same gravas la personaj pronomoj, sed la dua persono plurala estas dufoje esprimita, ankaŭ per superflua sufikso (aŭ pronomo). En tokpisino pronomoj ankaŭ gravas, sed la triaj personoj estas markitaj per predikata markilo *i*. Tamen en la germana ni trovas redundon en kvar el la ses kazoj, duoble aŭ trioble markitaj per pronomoj, fonetika ŝanĝo de la radiko kaj sufiksoj. Tia redundo nur minimume kontribuas al klareco de la eldiro.

3 Zorge alportis patrino la klaran vinon mirindan, // En facetita botelo, sur brila plato el stano, // Kun la verdecaj romujoj, la veraj rejnvinaj kalikoj. (Traduko de la aŭtoro de la nuna artikolo)

En aliaj okazoj ĝi tamen estas preskaŭ necesa por doni klarecon. En la franca la tri vortoj *oui* (*aŭdita*), *oui* (*jes*) kaj *hui* (*hodiaŭ*) hodiaŭ havas la saman elparolon. Pro tio estiĝis la redunda esprimo *aujourd'hui* (*au jour de hui, dum la hodiaŭa tago*), kiu estas tute klara. En la ĉina la vortoj “十” (*dek*) kaj “识” (*scii*) ambaŭ estas elparolataj /shí/. Do, por certigi la komprenon *scii* oni simple aldonis la vorton “认” (*kompreni*), elparolata /rèn/, al “识”, kaj hodiaŭ la ĉina vorto por *scii* estas “认识”, elparolata /rènshí/. Fakte, granda parto de la hodiaŭa ĉina vortaro estas formata laŭ tia ŝablono por eviti homofonion.



ILUSTRAĴO 2.1

La kompromiso inter klareco kaj koncizeco.

Ni do vidis, ke en multaj kazoj redundo je la kostoj de koncizeco povas konsiderinde plibonigi la klarecon kaj pro tio indas. En aliaj kazoj la kontribuo de redundo estas neglektenda kaj pro tio superflua. Ni povas ilustru la kompromison inter klareco kaj koncizeco en malgranda diagramo; vidu ilustraĵon 2.1. La dekliva linio reprezentas la eblajn kompromisojn inter klareco kaj koncizeco; ni povas nomi ĝin efikecfronto. Kie sur la efikecfronto lingva trajto estas optimuma, ne estas facile decidi, sed ĝenerale devas esti ie en la centro. Tro da koncizeco malfaciligas la komprenon kaj tro da klareco ne necesas, ĉar por parolanta kaj aŭskultanta homo la kunteksto multe helpas. Eble

la stelo estas bona loko. La malkonciza germana lingvo kun la troa superflua redundo ne atingas la fronton. En la ĉina la redundo en la vortfarado metas la lingvon sur aŭ tre proksime al la fronto rilate la vortfaradan trajton.


2.2 Precizeco kontraŭ fleksemo

En multaj lingvoj ekzistas terminoj, kiuj ne estas tre precizaj, kiujn oni en kazo de neceso povas precizigi. Komparu la vortojn *landing* (de aviadilo) en la angla, *atterrissage* en la franca kaj *surteriĝo* en esperanto. Se la aviadilo por fini la flugon ekhaltas sur akvo, en la franca, kaj analoge en esperanto, oni devas diri *amerrissage*. Laŭ mia kono ne ekzistas ununura simpla vorto en la franca, aŭ en esperanto, kun la signifo *fini la flugon kaj halti*. Kompreneble oni povas en la angla komuniki la sencon de ambaŭ francaj vortoj per aldono de *on the ground* aŭ *on the water* aŭ simile. La diferenco inter la du lingvoj tamen estas, ke en la angla oni normale povas komuniki la agon kun malpli da peno, uzante ĝeneralan terminon, ol en la franca, kie oni devas elekti inter du precizaj vortoj. La gajno en la franca estas pli preciza komunikaĵo, kiu kostas penon. En tiu ĉi kazo la precizeco en la franca estas deviga kaj la angla

estas pli fleksema. Oni povus paroli pri neceso kaj sufiĉo; en kazo de la angla sufiĉas fleksemo, en la franca necesas precizeco.

Ni trovas tiajn fenomenojn en multaj lingvoj kaj en multaj partoj de la lingva sistemo. En la sistemo tempo-modo-aspekto de esperanto regas granda fleksemo. Normale necesas nur esprimi simplajn tempajn rilatojn, sed pli precizaj eblas en kazo de bezono. Aliaj lingvoj estas eĉ pli flekseblaj. En la ĉina ofte sufiĉas diri sen peno “他买一本书” (*li aĉetis/as/os libron*). Se oni deziras plian precizecon, oni kun iom da peno aldonu markilon “了” por montri, ke la ago estas finita, “他买了一本书” (*li estas/is aĉetinta libron*), aŭ “今天” (*hodiaŭ*) por fiksi la agon tempe, “今天他买一本书” (*hodiaŭ li aĉetis/as/os libron*), aŭ aron de aliaj markiloj por tempo, modo kaj aspekto. En la kompromiso inter precizeco kaj fleksemo la ĉina akceptas multe da fleksemo, sed ankaŭ, kiel ĉiu lingvo, permesas grandan precizecon, se necesas, sed je kostoj de pli da peno. Sur la flanko de deviga precizeco ni havas ekzemplon en la aspekta parto de la lingvosistemo de la angla: estas devige distingi inter esprimoj kiel *yesterday, she bought a book* (*hierau ŝi estis aĉetinta libron*) kaj *yesterday, she was buying a book* (*hierau ŝi estis aĉetanta libron*), kaŭzante penon ĉe la parolanto. En esperanto oni povas traduki ambaŭ anglajn esprimojn kiel *hierau ŝi aĉetis libron* se la aspekto ne gravas por la rakonto; en la angla tio ne eblas: oni devas devige precizigi la aspekton.

Ankaŭ ĉi tie ŝajnas ke la optimumo kuŝas ie inter la du ekstremoj. Tro da precizeco ofte estas superflua, sed tro da fleksemo en la lingva sistemo devigas la parolanton fari multe da decidoj dum la parola procezo kaj la aŭskultanton diveni multon de la kunteksto. En ilustraĵo 2.2 ni montras la kompromison en la kazo de la elaerigata aviadilo.



ILUSTRAĴO 2.2

La kompromiso inter precizeco kaj fleksemo

2.3 Reguleco kontraŭ oportuneco

Por minimumigi la mensan penadon la parolanto povas konsulti regulajn ŝablonojn por formi vortojn aŭ fleksiajn aŭ derivajn formojn de vortoj. Se la fleksio fariĝas komplika kun ne-regulaj, sed mallongaj formoj, estas pli facile memorigi la finan produkton ol la regulon. Konsideru la germanan vorton *sprechen* (*paroli*), kiu en preterito havas la formon *sprach*. Se ĝi estus regula verbo, ĝi havus la formon *sprechte**. Por lerni la formon *sprach*, necesas iom da peno unufoje, fiksajn kostojn *F*, kiuj aldoniĝas al la kostoj lerni la morfem

sprech. Poste, kiam oni uzas ĝin la ĉiufojaj variaj kostoj je ĉiu uzo v estas relative malaltaj, ĉar la vorto estas mallonga kaj kuŝas preta en la cerbo. Komparu kun la vorto *reden* kun la sama signifo, sed kun la regula formo *redete* en preterito. La regula sistemo estas facile lernebla, kaj la parolanto iam devis lerni la morfemon *red*, kaŭzante malaltajn unufojan fiksjajn kostojn f , sed ĉiufoja uzo signifas enŝalti la cerbon por uzi la sistemon kaj aldoni *-ete* kaj elparoli pli longan, trisilaban vorton, kiu entute kaŭzas altajn variajn kostojn V .

La cerbo tamen malrapide kadukiĝas, kaj lernitaj aferoj devas esti renovigitaj de tempo al tempo. Do, ankaŭ la fiksjaj kostoj renoviĝas. La interesa afero tamen estas kiom ofte oni devas alfronti la variajn kostojn. Diru, ke dum periodo ĝis la renovigo de la fiksjaj kostoj, oni uzas vorton n -foje. Tiam por vorto kiel *sprach* uzata n fojojn la tutaj kostoj estas:

$$K_{nereg} = F + nv$$

kaj por vorto kiel *redete*:

$$K_{reg} = f + nV$$

Ni povas kompari la kostojn de la du uzoj, kaj la kostoj de la uzo de regula verbo malsuperas la kostojn de la uzo de la neregula verbo se

$$K_{nereg} \leq K_{reg};$$


tio estas, se

$$F + nv \leq f + nV$$

aŭ se:

$$\frac{F - f}{V - v} =: n^* \leq n$$

Do, se la vorto ofte uzatas, $n > n^*$, estas pli efike uzi malregulan mallongan formon. Se ĝi relative maloftas, $n < n^*$, la sistema regula formo donas la plej malaltajn kostojn. Ni povas do atendi, ke pli granda proporcio de fleksioj de altefrekventaj vortoj havas neregulajn formojn ol de relative maloftaj vortoj. En multaj lingvoj ekzemple konjunktivaj verboformoj estas tute regule formitaj, dum multaj indikativoj havas neregulajn formojn.



ILUSTRAĴO 2.3

La kompromiso inter
reguleco kaj oportuneco

La sama principo kompreneble uzeblas pri kunmetaĵoj, ekzemple *wagonaro* kaj *trajno*, *maldekstra* kaj *liva*, *malmulta* kaj *poka* aŭ *maljuna* kaj *olda*. Ilustraĵo 2.3 montras la lokojn en la diagramo reguleco-oportuneco de la germana kaj esperanto rilate leksikon.

3 Komparo inter esperanto kaj tokpisino

Nia baza hipotezo estas, ke per malsamaj procezoj planlingvo kaj piĝina/kreola lingvo ambaŭ serĉas facilajn vojojn por komuniki. Ĉe planlingvo tio estas konscie farata dum la kreado de la lingvo per ties kreinto. En piĝina/kreola lingvo tio spontanee okazas, kiam interparolantoj serĉas rimedojn por sin esprimi. Ĉi tie ni analizos kelkajn ekzemplojn komparante la planlingvon esperanto kaj la kreolan lingvon tokpisino (Tok Pisin). Ne endas priskribi esperanton en tiu ĉi revuo. Sufiĉas diri, ke ĝi estis publikigita en la jaro 1887, kaj ekde tiam estas uzata kaj utiligata en preskaŭ ĉiuj domenoj de la vivo. Tokpisino havas pli-malpli la saman aĝon. Ekzistas unuaj mencioj de la mezo de la 19a jarcento kaj tekstoj ekde la 1880-aj jaroj. Ĝi estas hodiaŭ nacia lingvo en Papuo-Novgvineo kaj estas uzata en ĉiuj domenoj de moderna vivo. Tre proksimaj, parencaj lingvoj estas bislamo, nacia lingvo en Vanuatuo, kaj la pijina, parolata en Salomonoj. Du aliajn lingvojn oni ofte mencias, kiel membrojn de la familio, brokenon – la kreolan de Toreso – kaj kreolon de norda Aŭstralio; ili tamen lingvistike estas iom pli for de tokpisino ol la aliaj du.

Ekzistas grandega literaturo pri tokpisino, bislamo kaj pijino. Wurm k Mühhlhäusler (1985), Verhaar (1990) kaj ankaŭ Tryon k Charpentier (2004) donas bonajn, abundajn kaj ĝeneralajn priskribojn de la piĝinaj/kreolaj lingvoj de Melanezio. La historio de bislamo troviĝas en Charpentier (1979), kaj Crowley (2004) produktis plenan gramatikon de la lingvo. En Mühhlhäusler, Dutton k. Romaine (2003) oni trovas kolekton de 100 tokpisinaj tekstoj ekde la mezo/fino de la 19a jarcento ĝis la 70aj jaroj de la pasinta jarcento. Gramatikon de tokpisino skribis inter aliaj Verhaar (1995), kaj Smith (2002) priskribas la evoluon de la hodiaŭa lingvouzo de denaskuloj. Tre bona vortaro de bislamo estas Crowley (2003). Volker (2008) estas konciza vortaro de tokpisino. Pli ampleksa, sed ne tiom aktuala vortaro estas Mihalic (1971).

3.1 Ĝenerala strukturo

Tokpisino estas ĝenerale izolanta lingvo sed kun kelkaj aglutinaj trajtoj. Esperanto, kiel ni scias, estas tre aglutina lingvo. Do, en la morfologia strukturo la du lingvoj ne tro diferencas. Ankaŭ en la sintaksa tipologio ili similas: ambaŭ estas ĉefe lingvoj subjekto-verbo-objekto. En esperanto la plej grandaj vortklasoj estas markitaj laŭ kategorio (kun *o*, *a*, *i/as/is/os/u/us* kaj *e/aŭ*). Tokpisinaj vortoj ne estas tiel klare markitaj. Substantivoj estas tute ne markitaj. Adjektivoj kaj numeraloj (oni povus diri “modifantoj de substantivoj”) ĝenerale estas markitaj per sufikso *-pela*, kaj verboj kun predikata markilo *i* en la tria persono kaj, se ili estas transitivaj, per sufikso *-im*. Kelkaj tiaj verboj ankaŭ uzeblas kiel substantivoj, ekzemple *askim* = *demando*, *pilim* = *sento* kaj *traim* = *klopodo*. Gramatikaj funkcioj, kiuj en esperanto ĝenerale estas markitaj per sufiksoj kaj prefiksoj, en tokpisino esprimiĝas per izolitaj markiloj, ekzemple pluralo per *ol* aŭ progesa aspekto per *i stap*: *ol meri i wok i stap* = *la virinoj estas/is laborantaj*. En tokpisino, kiel en esperanto, la divido inter adjektivo kaj verbo ne estas tre akra. Esprimoj kiel *sista bilong em i naispela tru tomas = lia fratino vere tre belas*, en kiu la predikata adjektivo *naispela* (*bela*) estas uzata kiel verbo – markita per *i* –, tre oftas.

Similaĵo inter la du lingvoj estas, ke netransitiveco kaj transitiveco ĉiam estas disaj – kaj en tokpisino preskaŭ ĉiam markitaj – kategorioj en ambaŭ lingvoj: *kibung i kamap long ten klok* = *la kunsido komenciĝos je la deka horo* kaj *lapun i kamapim kibung long ten klok* = *la maljunulo komencos la kunsidon je la deka horo*.

La vortaro de tokpisino ĉefe devenas de la angla, sed multe da radikoj oni prenis de indiĝenaj lingvoj de la regiono (ekz. *amamas* = *ĝojo*, *binatang* = *viruso*, *kaikai* = *manĝi*, *pukpuk* = *krokodilo*, *tambu* = *tabuo*, *tumbuna* = *praparenco*) aŭ havas germanan originon (ekz. *beten* = *preĝi*, *boksen* = *boksi*, *dumekerl* = *stultulo*, *kese* = *fromaĝo*, *raus!* = *for!*, *segen* = *beno*).⁴

En la cetero de tiu ĉi eseo ni selektos kelkajn trajtojn de la lingva sistemo por vidi, je kioma grado oni povas paroli pri komunika optimumigo laŭ la analizo en sekcio 2. Ni konscias pri la fakto, ke ni ne prezentas abundan priskribon de la lingvo. Ni selektis kelkajn partojn de la gramatika strukturo, kiuj laŭ ni gravas por komunikado. La plej granda manko certe estas, ke ni tute ne preparolas la fonologion. La diskuto koncentriĝas sur la morfologio, simpla sintakso kaj kelkaj aspektoj de la leksiko. La sintakso estas multe pli riĉa, ol kio troviĝas en tiu ĉi eseo. Per la prezentado ni volas doni instigojn por pliaj pli profundaj analizoj de la komplekseco de piĝinaj/kreolaj lingvoj

4 De 1884 ĝis 1914 parto de Papuo-Novgvineo estis germana kolonio kun la nomo Bismarkaj Insularoj. Do, ĉefe pere de germanaj misiistoj la germana lingvo dum tiu tempo havis certan influon sur la indiĝenan popolon.

kompare esperanton, kaj de la procesoj malantaŭ la evoluo de kaj piginaĵ/kreolaj lingvoj kaj planlingvoj.

En la teksto ni ne donas fontindikojn de la pridiskutataj ecoj. Ili ĉiuj estas bone konataj kaj troviĝas en la gramatikoj aŭ vortaroj sur la literaturlisto, kie oni povas enprofundiĝi en ili, kaj en la esceptoj kaj varioj, kiujn ni prisilentas.

3.2 Klareco kaj koncizeco

Pro la deviga akordo de nombro kaj kazo en substantivaj frazoj esperanto havas relative multe da redundo. En la frazo, *Ŝi forigis la malgrandajn knabojn, kiuj estis revenintaj senkiale*, la akuzativo estas dufoje kaj la pluralo kvarfoje markitaj. Tio tamen malmulte kontribuas al la klareco de la eldiro. Koresponda eldiro en tokpisino, *Em i rausim ol bikipela manki i kambek nating pinis*, estas tute klara sen iu ajn redundo. La akuzativobjekto estas markita unufoje per la finaĵo *-im*, kiu informas nin, ke la verbo estas transitiva kaj la pluralo markitas unufoje per la pluralmarkilo *ol*. Ĉiu verbo estas markita po unufoje en ambaŭ lingvoj, per *-is* en esperanto kaj per *i* en tokpisino; la tempo ne estas markita en tokpisino, sed la perfekta aspekto estas markita po unufoje en ambaŭ lingvoj, *-int-* en esperanto kaj *pinis* en tokpisino.

En tiu ĉi kategorio tokpisino estas pli konciza ol esperanto. La akordiĝo en esperanto, kiu ne multe plialtigas klarecon kaj pro tio superfluas, tre verŝajne estas influo de la naciaj lingvoj konataj de Zamenhof, ekzemple de la latina, la rusa, la pola, la franca, kaj iom malpli de la germana kaj la jida. Interesa demando estas, kial Zamenhof transprenis la akordiĝon de kazo kaj nombro en substantivaj frazoj el tiaj lingvoj, sed ne faris ion similan en la konjugacio de verboj, kie la fontolingvoj akordigas personon kaj nombron de subjekto kun la predikata verbo.

Ĉi tie tokpisino pli proksimiĝas al opimumo ol esperanto. Tio ilustrigas en bildo 4.1e en sekcio 4.

3.3 Precizeco kaj flekseco

Ĉe la substantivoj la markilo de pluralo ne ĉiam estas deviga en tokpisino. Ĝi do en tiu parto de la sistemo estas pli fleksebla ol esperanto, kiu devige postulas markadon de pluralo ĉe pluralaj esprimoj. Do, en la deklinacio esperanto estas pli preciza ol tokpisino: vidu ilustraĵon 4.1a.

TABELO 3.1

Personaj pronomoj en tokpisino

persono	nombro	kluzemo	esprimo	traduko
1	singulara	(ekskluda)	mi	mi
	duala	inkluda	yumitupela	ni (vi kaj mi)
		ekskluda	mitupela	ni (ambaŭ sen vi)
	triala	inkluda	yumitripela	vi (ambaŭ kaj mi)
		ekskluda	mitripela	ni (tri sen vi)
	plurala	inkluda	yumi	ni (kun vi)
		ekskluda	mipela	ni (sen vi)
2	singulara	—	yu	vi (sola)
	duala	—	yutupela	vi (du)
	triala	—	yutripela	vi (tri)
	plurala	—	yupela	vi
3	singulara	—	em	li/ŝi/ĝi
	duala	—	tupela	ili (ambaŭ)
	triala	—	tripela	ili (tri)
	plurala	—	ol	ili

Male estas ĉe la pronomoj de tokpisino; vidu tabelon 3.1. Ĉi tie regas fleksemo nur en la tria persono singulara, kie esperanto postulas grandan precizecon. *Em* povas montri al viro, virino aŭ objekto. Se precizeco gravas, oni povas diri *em man* por *li*, *em meri* por *ŝi* aŭ *em ting* por *ĝi*. Ĉi tie denove Zamenhof verŝajne estis influata de siaj lingvokonoj. Oni povas demandi, ĉu li estus farinta la samon, se li estus konanta la finnan aŭ hungaran?

Krom en la tria persono singulara tokpisino estas tre preciza rilate personajn pronomojn. Oni devige markas kvar nombrojn kaj en la unua persono du kluzemojn. Kie esperanto havas kvar pronomojn, tokpisino devige uzas 13! Tio certe ne estas optimuma; ĉi tie la influo de naciaj lingvoj kaj eble sociaj normoj sur tokpisinon ŝajnas esti tre forta. La formoj de la unua kaj dua personoj tamen estas perfekte regulaj kun la ekskluda unua persono *mi*, la inkluda *yumi* kaj la dua persono *yu* kaj la nombroj donitaj de *-tupela*, *-tripela* kaj *-pela*. (Komparu kun la ĉina en tabelo 2.1.) Ambaŭ lingvoj tamen troviĝas sur la efikecfronto rilate tiun ĉi trajton, vidu ilustraĵon 4.1b.

En la sistemo de tempo, modo kaj aspekto en tokpisino abundas markiloj. Ili tamen tre ofte estas nedevegaj.

Tempo estas aŭ markita per adverbo kiel *bipo* = *antaŭe* aŭ per markiloj *bai* por futuro kaj *bin* por (relativa) pasinteco: *mi bai stori hau mi bin statim wok belong mi long rises* = *mi rakontos, kiel mi komencis mian esploradolaboron, stori* =

rakonti, *hau* = kiel, *statim* = komenci, *wok* = laboro, *rises* = esplorado. Tradicie la markiloj de tempo estas nedevigaj, sed ŝajne almenaŭ la markilo de estonteco *bai* estas hodiaŭ preskaŭ deviga. En esperanto tamen tute deviga estas la markado de simplaj tempoj, kaj pro tio ĝi malpli fleksemas ol tokpisino.

En la markado de aspekto ambaŭ lingvoj estas relative fleksemaĵoj kun nedevigaj markiloj en tokpisino kaj nedevigaj morfologiaj sufiksoj kaj prefiksoj aŭ adverboj en esperanto. Vidu tabelon 3.2. La du lingvoj estas tre similaj en tiu parto de la lingvosistemo kaj en ties fleksemaĵoj.

Por esprimi modon la lingvoj ankaŭ tre similas. Ambaŭ ĉefe uzas modajn helpverbojn, kiuj povas esprimi permeson (*ken* = *rajti*), deziron (*laik* = *voli*), devon (*mas* = *devi*), kapablon (*nap/inap* = *povi*) aŭ scipovon (*save* = *scipovi*). Esperanto aldone povas uzi *-u* kaj *-us* kiel modajn markilojn. Tokpisino markas la korespondajn esprimojn sintakse.

Ĉar esperanto devige esprimas tempon, ĝi estas iom malpli fleksema ol tokpisino rilate tempon, sed rilate modon kaj aspekton ambaŭ lingvoj estas tre flekseblaj kaj alproksimiĝas al optimumo, vidu ilustraĵon 4.1c.

TABELO 3.2

Markiloj de aspekto

kategorio	markilo	esprimo	traduko
fina	pinis	ol i sing pinis	ili finkantis
progres	i stap	ol i sing i stap	ili estas/is kantantaj
progres	wok long	ol i wok long harim mi	ili estas/is aŭskultantaj min
kutima	i save	tumbuna bilong mi i save kaikai man	mia praparenc
komenca	kirap	lapun i kirap sing	la maljunulo ekkantas/is
komenca	stat	lapun i stat sing	la maljunulo ekkantas/is
daŭra	(ripeto)	dispela profes	tiu profesoro ade parolas
daŭra	i go i go	ol i pait i go i go	ili daŭre batalas
ripeta	gen	mi go gen long ples bilong mi	mi reiras/is al mia vilaĝo

3.4 Reguleco kaj oportuneco

Se ni ignoras la esperantajn formojn kiel *panjo* = *patrineto* aŭ *Miĉjo* = *Mikaeleto*, en la morfologio esperanto estas tre regula kaj tokpisino iom malpli. Fakte ekzistas apenaŭ fleksio en tokpisino. Nur du sufiksoj, la finaĵoj *-im*, kiu montras transitivecon, kaj *-pela*, kiu kreas modifantojn de substantivoj, povas esti nomitaj fleksiaj: vidu tabelon 3.3.

La sufikso *-im* preskaŭ ĉiam necesas por esprimi transitivecon. Ekzistas nur malmultaj vortoj kiel *kaikai*, kiuj havas du transitivajn signifojn, unu kun kaj unu sen *-im*. En esperanto la sufikso *-ig* ofte havas la saman funkcion kiel

TABELO 3.3

Uzu de la fleksiaj sufiksoj *-im* kaj *-pela*

(d = derviga, n = nedeviga, m= malpermesita)

radiko	signifo	esprimo	traduko	uzo
raus!	for!	rausim	forigi	d
stat	komenciĝi	statim	komenci	d
ain	fero	ainim	glatigi	d
strong	forto	strongim	antaŭenigi	d
bihain	malantaŭ	bihainim	sekvi	d
kaikai	manĝi	em i kaikai kaukau	li manĝas bataton	m
kaikai	manĝi	dok i kaikaim mi	la hundo mordis min	d
tu	du	tupela meri	du virinoj	d
pat	dika	lapun i pat(pela)	la maljunulo dikas	n
		patpela lapun	dika maljunulo	d
strong	forto	manki i strongpela	la knabo fortas	d
		strongpela manki	forta knabo	d
doti	malpura/malpuraĵo	pukpuk i doti	la krokodilo malpuras	m
		dotipela pukpuk	malpura krokodilo	d

-im, sed tokpisino estas multe pli konsekvenca ol esperanto. Esperanto estas multe malpli regula ĉi tie sen gajni ion ajn pro oportuneco.

Ni ankaŭ notas, ke *-pela* estas deviga, se la vorto estas atributo, sed kiel predikato ĝi ĉe kelkaj vortoj estas deviga, ĉe aliaj ne deviga kaj ĉe kelkaj malpermesata iom depende de la gramatika klaso de la radiko, sed baze arbitra. Ĉi tie esperanto estas multe pli regula ol tokpisino, kiu tamen ne estas pli oportuna pro la arbitreco. Vidu ilustraĵon 4.1ĉ.

Ekzistas multaj derivaj sufiksoj en tokpisino, de kiuj nur kelkaj estas relative regulaj, sed antonimoj ofte konstruiĝas regule per prefikso *no-* kiel en esperanto kun *mal-*. Vidu tabelon 3.4. Ĝenerale tokpisino tamen simple transprenis multajn derivitajn vortojn senpere de la angla. Pro tio ĝi estas pli neregula ol esperanto kun ties granda aro da sufiksoj kaj prefiksoj. Ni tamen povas vidi en la tabelo, ke kelkaj regule derivitaj esprimoj en tokpisino korespondas al neregulaĵoj en esperanto (aŭtoro, advokato).

En la leksiko de ambaŭ lingvoj ni trovas multajn similspecajn kunmetaĵojn; vidu tabelon 3.5. Tokpisino tamen ofte uzas parafrazojn. Kelkaj troviĝas en tabelo 3.6. La sistemo de esperanto estas aŭ pli regula aŭ pli oportuna. Tokpisino certe kun la tempo importos pli mallongajn kaj oportunajn terminojn de aliaj lingvoj (ĉefe de la angla).

TABELO 3.4

Du derivaj sufksoj *-a* kaj *-man* kaj prefikso *no-*

radiko	signifo	esprimo	traduko
boksen	boksi	boksa	boksisto
tis	instrui	tisa	instruisto
rait	skribi	raita	aŭtoro
fam	bieno	fama	kamparano
spik	diri	spika	(parlament) prezidanto
visit	viziti	visita	vizitanto
stil	ŝteli	stilman	ŝtelisto
sin	peki	sinman	pekulo
lo	leĝo	loman	advokato
save	scii	saveman	spertulo
stron	forta	nostrong	malforta
gut	bona	nogut	malbona
les	maldiligenta	noles	diligenta
kamup	ĉeestanta	nokamup	forestanta

TABELO 3.5

Kelkaj kunmetaĵoj

radiko ₁	signifo	radiko ₂	signifo	esprimo	traduko
wan	unu	tok	paroli	wantok	samlاندano
haus	domo	sik	malsana	haus sik	malsanulejo
bik	granda	maus	buŝo	bikmaus	laŭtparolilo
kaikai	manĝi	maus	buŝo	kaikai maus	kisi

TABELO 3.6

Kelkaj parafrazoj

radiko ₁	signifo	radiko ₂	signifo	esprimo	traduko
brukim	rompi	tilim	dividi	brukim na tilim	dismembrigi
meri	virino	bilong	de	meri bilong meri	samseksulino
saveman	spertulo	tok ples	denaska lingvo	saveman bilong ol tok ples	lingvisto
nidim	bezoni	no	ne	i no nidim	forigebblas
man	homo	wok	laboro	ol man i no gat wok	senlaboruloj
brata	frato	tamiok	hakilo	brata bilong tamiok	segilo
kalabus	malliberejo	susu	mamo	kalabus bilong susu	mamzono

Ĝenerale nek tokpisino nek esperanto estas optimumaj. En derivado esperanto estas pli regula ol tokpisono, sed oportuneco ofte mankas malgraŭ la ekzisto, sed poka uzo, de vortoj kiel *eta*, *liva* aŭ *olda* por tre oftaj konceptoj. En tokpisino ankaŭ oftas altfrekvencaj parafradoj, sed iom post iom ili estas anstataŭigataj per pli mallongaj esprimoj. Ekzemple la markilo de futuro antaŭe estis baimbai, nun bai, sed en parola lingvo oni povas diri /bol i kam/ por *bai ol i kam = ili venos*. La adjektivo *blinda* povas esti *ai i tudak = (kies) okulo malhelas* aŭ *no save lukluk = (kiu) ne povas vidi*, sed ankaŭ *aipas = (kun) blokita okulo*, kaj la substantivo *bremso* povas esti aŭ *kalabus bilong wil = malliberejo de la rado* aŭ *brek*. En ilustraĵo 4.1d ni montras la pozicion de la vortaro de la lingvoj en la dimensioj reguleco-oportuneco.







4 Konkludo

Estas multaj similecoj inter esperanto kaj tokpisino. La morfologia strukturo kiel lingvoj izolantaj/aglutinaj kontribuas al granda reguleco de ambaŭ lingvoj. En la gravaj dimensioj precizeco-fleksemo ni trovas, ke ambaŭ lingvoj proksimas al la efikecfronto en la trajtoj, kiujn ni esploris. Nenio estas superflua. En la deklinacio esperanto pro la deviga uzo de pluralo estas iom pli preciza ol tokpisino kaj en la pronomoj tokpisino estas multe pli preciza ol esperanto. En la verbofrazoj ili tre similas. La granda diferenco estas, ke esperanto devige markas tempon, dum tokpisino devige montras nur futuron. Aldone ni notas, ke ambaŭ lingvoj estas tre fleksema sen perdo de precizeco pro tio, ke la sama vorto ofte povas funkcii en multaj vortklasoj, kie la klaso estas klare markita per sufiksoj en esperanto kaj sufiksoj aŭ sendependaj markiloj en tokpisino.

En la dimensio reguleco-oportuneco la oportuneco estas relative malgranda en ambaŭ lingvoj kun pli alta grado da reguleco, precipe en esperanto. Pro la sistemo de afiksoj en esperanto tiu lingvo estas tre regula, sed multaj oftaj esprimoj estas superflue maloportune longaj en la deriva morfologio. La derivaj sufiksoj en tokpisino ne estas tiom regulaj kiel en esperanto, sed ankaŭ en tiu lingvo multas maloportunaj esprimoj. Estas simile en la leksiko. Pro oftaj longaj parafradoj tokpisino estas tre maloportuna. Neniu lingvo verŝajne troviĝas sur la efikecfronto. Oni tamen povas observi ŝanĝojn en tiuj trajtoj, ekzemple pli ofta uzo de vortoj kiel *liva*, *eta* aŭ *ege* en esperanto kaj mallongigoj de kunmetitaj vortoj aŭ anstataŭigo de parafradoj kun importitaĵoj en tokpisino. Tio movas la poziciojn pli proksimen al la efikecfronto en diagramo 4.1d.

ILUSTRAĴO 4.1

Relativaj posicioj de kelkaj trajtoj de esperanto kaj tokpisino laŭ precizeco/fleksemo (pr/fl), reguleco/oportuneco (re/op) kaj klareco/koncizeco (kl/ko)

(a) *Deklinacio*(b) *Pronomo*(c) *Tempo/aspekto/modo*(ĉ) *Morfologio*(d) *Leksiko*(e) *Akordiĝo*

Fine, pro la ofte superflua akordiĝo de nombro kaj akuzativo en esperanto ĝi estas iom superflue malkonciza kompare al tokpisino.

Ĝenerale ni povas diri, ke la hipotezon, ke la du lingvosistemoj estas relative parencaj laŭ la traktitaj kriterioj, oni ne povas forĵeti pro la indikoj en tiu ĉi eseo. Por fari la hipotezon pli kredinda tamen necesas pli profunda rigardo al la lingvosistemoj, ne nur de tokpisino kaj esperanto, sed al komunaj trajtoj de multaj kreolaj lingvoj kaj planlingvoj.

Bibliografio

- Ansaldo, U. (2017). Creole complexity in sociolinguistic perspective. *Language Sciences*, 60, 26-35.
- Charpentier, J-M. (1979). *Le pidgin Bislama(n): et le multilinguisme aux Nouvelles-Hébrides*. Vol. 35. Langues et civilisations à tradition orale. Paris: Société d'études linguistiques et anthropologiques de France – SELAF.
- Chiari, I. (2007). Redundancy elimination: The case of artificial languages. *Journal of Universal Language*, 8, 7-38.

- Crowley, T. (2003). *A new Bislama dictionary*. Dua eldono. Suva: Institute of Pacific Studies, University of the South Pacific.
- Crowley, T. (2004). *Bislama Reference Grammar*. Vol. 31. Oceanic Linguistics Special Publication. Honolulu: University of Hawai'i Press.
- Gelderen, E. (2004). *Grammaticalization as Economy*. Amsterdam: John Benjamins.
- Gobbo, F. (2017). Are planned languages less complex than natural languages? *Language Sciences*, 60, 36-52.
- Goethe, J. W. (1814). *Herrmann und Dorothea*. Braunschweig: Friedrich Vieweg.
- Good, J. (2012). Typologizing grammatical complexities: Or why creoles may be paradigmatically simple but syntagmatically average. *Journal of Pidgin and Creole Languages*, 27(1), 1-47.
- Good, J. (2015). Paradigmatic complexity in pidgins and creoles. *Word Structure*, 8(2), 184-227.
- Heil, A. (1999). *Grammatische Reduktion in Frankokreolsprachen und Plansprachen*. Vol. 2. Rostocker Romanistische Arbeiten. Frankfurt am Main: Peter Lang.
- Liu, H. (2001a). Creoles or planned languages: Which have the simpler grammar? *Esperantologio / Esperanto Studies*, 2, 53-57.
- Liu, H. (2001b). Creoles, pidgins, and planned languages: Language evolution under special conditions. *Interface. Journal of Applied Linguistics*, 15, 121-177.
- Lo Jacomo, F. (1989). Optimization in language planning. En K. Schubert (Red.), *Interlinguistics: Aspects of the Science of Planned Languages* (p-oj 121-128). Berlin: Mouton de Gruyter.
- Mihalic, F. (1971). *The Jacaranda Dictionary and Grammar of Melanesian Pidgin*. Milton, Queensland: Jacaranda Press.
- Mühlhäusler, P. (1992). Shared properties of pidgins and artificial languages. En T. Dutton, M. Ross, & D. Tryon (Red-oj), *The Language Game: Papers in Memory of Donald C. Laycock* (p-oj 283-290). Camberra: Pacific Linguistics.
- Mühlhäusler, P., Dutton, T., & Romaine, S (Red-oj) (2003). *Tok Pisin Texts: From the Beginning to the Present*. Vol. T9. Varieties of English Around the World. Amsterdam: John Benjamins.
- Nash, J. (2014). The atlas of pidgin and creole language structures/The survey of pidgin and creole languages. *Australian Journal of Linguistics*, 34(3), 426-429.
- Parkvall, M. (2008). The simplicity of creoles in a cross-linguistic perspective. En M. Miestamo, K. Sinnemäki, & F. Karlsson (Red-oj), *Language*

- Complexity: Typology, Contact, Change*. Vol.94. Studies in Language Companion Series (p-oj 265-285). Amsterdam: John Benjamins.
- Philippe, B. (1991). *Kreolsprache und Plansprache: konfrontative Darstellung von Gemeinsamkeiten zwischen den französischen Kreolsprachen und Esperanto*. Wien: Internationales Esperanto-Museum.
- Smith, G. P. (2002). *Growing up with Tok Pisin: Contact, Creolization, and Change in Papua New Guinea's National Language*. London: Battlebridge Publications.
- Tryon, D. T., & Charpentier, J-M. (2004). *Pacific Pidgins and Creoles: Origins, Growth and Development*. Vol. 132. Trends in Linguistics. Studies and Monographs. Berlin: Mouton de Gruyter.
- Verhaar, J. W. M. (Red.) (1990). *Melanesian Pidgin and Tok Pisin*. Vol.20. Studies in Language Companion Series. Amsterdam: John Benjamins.
- Verhaar, J. W. M. (1995). *Toward a Reference Grammar of Tok Pisin: An Experiment in Corpus Linguistics*. Vol. 26. Oceanic Linguistics Special Publication. Honolulu: University of Hawai'i Press.
- Volker, C. A. (Red.) (2008). *Papua New Guinea Tok Pisin-English Dictionary*. South Melbourne: Oxford University Press.
- Wurm, S. A., & Mühlhäusler, P. (Red-oj) (1985). *Handbook of Tok Pisin (New Guinea Pidgin)*. Vol. C-70. Pacific Linguistics. Canberra: Australian National University.

Pri la aŭtoro

Bengt-Arne Wickström naskiĝis en Svedio en 1948. Post studoj kaj doktoriĝo en Usono li profesoris pri la ekonomiko de la publika sektoro en la Universitato de Bergen, Norvegio, Johannes-Kepler-Universität en Linz, Aŭstrio, kaj Humboldt-Universität zu Berlin, Germanio, ĝis sia pensiĝo. Nun li estas gastprofesoro ĉe Andrásy-Universität en Budapeŝto, Hungario, kaj honora profesoro ĉe Universitato de Havano, Kubo. Li ankaŭ profesoras ĉe Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS San Marino). En sia esplorklaboro li pritraktis la teorion de bonfarto (ĉefe la ekonomikan teorion de justeco), la ekonomikan teorion de politiko kaj lastatempe la interrilatojn inter ekonomiko, lingvo kaj la estiĝo kaj evoluo de sociaj normoj. Dum kvin jaroj ĝis 2019 li estris esplorgrupon en Berlino pri ekonomiko kaj lingvo, kiu prilaboris parton de eŭrop-unia projekto MIME (Movebleco kaj inkluziveco en multlingva Eŭropo). Retadreso: bengt-arne@wickstroem.eu

ORCID-numero: 0000-0003-0363-8416

About the author

Bengt-Arne Wickström was born in Sweden in 1948. After studies and doctorate in the USA, he was a professor of Public Economics at the University of Bergen, Norway, at Johannes-Kepler-Universität, Linz, Austria, and at Humboldt-Universität zu Berlin, Germany, until his compulsory retirement. Now he is a guest professor at Andrassy-Universität of Budapest, Hungary, and an honorary professor at the University of Havana, Cuba. He is also a professor at the International Academy of Sciences (AIS San Marino). In his research, he has concentrated on welfare theory – mainly on economic theory of justice –, on economic theory of politics, and lately on the connection between economics, language, and the formation and evolution of social norms. During five years until 2019, he headed a research group in Berlin on economics and language which was occupied with part of the European Union project MIME (Mobility and Inclusion in Multilingual Europe).

Über den Verfasser

Bengt-Arne Wickström wurde 1948 in Schweden geboren. Nach Studium und Promotion in den Vereinten Staaten von Amerika wurde er Professor für Finanzwissenschaft an der Universität Bergen, Norwegen, an der Johannes-Kepler-Universität Linz, Österreich, und an der Humboldt-Universität zu Berlin, Deutschland, wo er bis zu seiner Versetzung in den Ruhestand blieb. Jetzt ist er Gastprofessor an der Andrassy-Universität Budapest, Ungarn, und Honorarprofessor an der Universität Havanna, Kuba. Er hat auch eine Professur an der Internationalen Akademie der Wissenschaften (AIS San Marino) inne. In seiner Forschung hat er sich mit Wohlfahrtstheorie – vor allem mit ökonomischer Theorie der Gerechtigkeit –, ökonomischer Theorie der Politik und in letzter Zeit dem Zusammenspiel zwischen Ökonomie, Sprache und dem Entstehen und der Entwicklung sozialer Normen beschäftigt. Während fünf Jahren, bis zum Jahre 2019, leitete er eine Forschungsgruppe zu Ökonomie und Sprache in Berlin, die einen Teil des durch die Europäische Union finanzierten Forschungsprojekts MIME (Mobilität und Inklusion in einem vielsprachigen Europa) bearbeitete.